# LA VOĈO DE AMIKEJO

TRIMONATA INFORMILO PRI ESPERANTO EN EUREGIO MOZO-REJNO


Senlime

Groupe espérantiste de Verviers

Avec le soutien de la Fédération Wallonie-Bruxelles


**En cas de non-distribution, merci de renvoyer à l'éditeur responsable:**
Jean-Marie **Jacques**,
5 rue Joseph Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informations en français**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
Mail: jacques@senlime.org
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH


**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Abono al **papera** versio de nia informilo (12€) eblas sed **NE** en-havas la kotizon al ***Senlime*** (10 €).

Bonvolu pagi prefere antaŭ la jarfino **NUR** al la konto :
**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta) de ***Senlime***,
25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.

## ENHAVO :


**p. 1: Editorial: Festa jaro por Amikejo**
**p. 2: Niaj programeroj lupee**
**p. 3: Eŭregiona kalendaro 2015-2016 (2/2)**
**p. 4: *Senlime* vous informe**


**Si vous souhaitez continuer à lire «La Voĉo de Amikejo» [La Voix d'Amikejo] veuillez vous abonner (12 EUR) ou le télécharger sur notre site internet (http://www.senlime.org/Info/Lasta.pdf) (L'«Esperanto en Marche» NE le publiant PLUS).**

# Festa jaro por Amikejo

Kadre de la Kongreso en Vieno, kiu devis redesegni la Eŭropan mapon post la malvenko de Napoleono, Prusio kaj Nederlando kverelis pri la posedo de zink-minejo de la Vieille-Montagne: la traktato pri la limoj, substrekita de Prusio kaj Nederlando la 26an de junio 1816, disigis la iaman urbon Moresnet en tri partojn, inter kiuj unu estas deklarita neŭtrala kaj pli poste iĝos esperantista "**amikejo**".

Okaze de la 200a datereveno de la "Traktato pri la limoj" (Aachen, 26an de junio 1816) ***Senlime*** invitas vin al speciala trilanda renkontiĝo: fakte "rendevuo" ĉe la trilandlima punkto inter Belgio, Germanio kaj Nederlando: promenemaj belgoj piede foriru de Kelmis (aŭ Moresnet-kapelo), germanoj de Akeno kaj nederlandanoj de Vaals. Vidu detalojn p. 5. Se vi ne deziras promeni, atendu nin en la "trilanda punkto" (apud Vaals), kie estas multaj eblecoj manĝi kaj sin distri (restoracioj, trinkejoj, labirinto, surgrimpeblaj turoj,...).

La urbo de Kelmis siaflanke decidis inviti moŝtojn por solene festi la 200-an datrevenon de la "Traktato pri la limoj" sabaton la 21an de majo kaj dimanĉon la 22an, per ekspozicio, diversaj paroladoj kaj prelegoj (kompreneble, interalie pri esperanto kaj Amikejo), kaj vespere muzik-koncerto en la preĝejo. La definitivan programon oni jam ne publikigis sed ĝin ni surretigos.



# Niaj programeroj lupee

***detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…***

**Novaj esperantistoj**

*ATENTU pri la datŝanĝo!*

Multaj spertaj esperantistoj timas ke esperanto malaperos pro manko da novaj samideanoj, kion povus konfirmi UEA-statistikoj!

Ja estas konate ke homoj inter 30 kaj 50 jaraĝaj ĝenerale ne trovas tempon por okupiĝi pri esperanto, pro troaj familiaj kaj laboraj devoj. Tamen trankviliĝu: nun aperas novaj esperantistoj!

Junuloj interesiĝas pri esperanto, kvankam ili lernas kaj uzas ĝin tute alimaniere ol la nunaj "veteranoj". Ni unue pensas pri la reto, kie eblas senkoste lerni kaj praktiki la lingvon. Sed ne temas nur pri tio: kelkaj lernejoj plu instruas ĝin kaj kelkaj junuloj eĉ malkovras ĝin ekster la lerneja kadro: mi citu ekzemple la skoltan movadon, kiu nun enhavas "verdajn" skoltojn.

Ankaŭ flanke de la "maljunujoj" (kiuj aĝas inter 50 kaj "77" jaroj) restas intereso, kiel ekzemple pruvas niaj nunaj Verviersaj kursoj ĉe ENEo, belga amikaro da maljunuloj.

Kompreneble tiaj novuloj ofte ne havas monon kaj ne facile membriĝas al niaj tro multnombraj organizaĵoj (ofte ne tre efikaj!).

Jean-Marie **Jacques** montros al ni kelkajn filmetojn pri ili, interalie dum PEKo (filmetoj kiujn ni jam ne povis vidi pro teknika problemo dum lia iama prelego pri PEKO).

**04-15** 20h00 Kelmis, Select: "Novaj esperantistoj", prelego de Jean-Marie **Jacques** (kun filmeta projekciado).
Inf. jacques@senlime.org

**Islando**

*ATENTU pri la datŝanĝo!*

Islando estas vulkana insulo, proksimume 103000 km2, en Norda Atlantiko inter Gronlando, Norvegio, Irlando, Skotlando kaj la Feroaj Insuloj. Multloke ĝi estas kovrita de glaciejoj, kaj la nomo de la lando signifas “Glacilando”. La ĉefurbo kaj plej granda urbo estas Rejkjaviko.
Antaŭ unu jaro, José **Jacob** komencis rakonti al ni sian vojaĝon en tiu vulkana lando. Jen la dua parto...

**05-20** 20h00 Kelmis, Select: "Islando, tero el fajro kaj glacio", prelego de José **Jacob** (kun lumbildoj).
Inf. jacques@senlime.org

**Karaoke de Senlime**

Ja estas nun konate ke ***Senlime*** regule organizas sian propran karaokeo-n en Kelmis, fine de junio, agrabla maniero ĝisrevidi fine de la lerneja jaro.

Karaoke kompreneble ne havas nur ludan celon, ĝi ankaù havas grandan kulturan valoron, se oni konsideras ke ĝi permesas konatigi eksterlandajn kantojn (ĉi-jare irlandajn, prepare al la St-Patrik festo, kiun ni organizos dum nia kunveno de la 17a de marto 2017).

**05-20** 20h00 Kelmis, Select: "Islando, tero el fajro kaj glacio", prelego de José **Jacob** (kun lumbildoj).
Inf. jacques@senlime.org

**Speciala Trilanda Renkontiĝo ĉe la Trilanda Punkto !**

Kadre de la Kongreso en Vieno, kiu devis redesegni la Eŭropan mapon post la malvenko de Napoleono, Prusio kaj Nederlando kverelis pri la posedo de zink-minejo de la Vieille-Montagne: la traktato pri la limoj, substrekita de Prusio kaj Nederlando la 26an de junio 1816, disigis la iaman urbon Moresnet en tri partojn, inter kiuj unu estas deklarita neŭtrala kaj pli poste iĝos esperantista "Amikejo".

Okaze de la 200a datereveno de tiu "Traktato pri la limoj", ***Senlime*** invitas la esperantistojn al speciala trilanda renkontiĝo: "rendevuo" ĉe la trilandlima punkto inter Belgio, Germanio kaj Nederlando),...

Nenio (krom gvidado ek de Kelmiso/Moresneto) estos organizita kaj ĉiu partoprenos sub sia propra responseco: nur okazos kuniĝo de la promenantoj apud la trilanda ŝtono (piede de la turo "Baudouin" je la 16-a h.), reciprokaj salutoj kaj komuna kantado de la himno de Amikejo (antaŭe trejniĝu kaj kunprenu la partituron kun la paroloj el nia informilo, p. 6). Interalie, ne forgesu ke, de tie, vi devos ankaŭ krome reiri al via deirpunkto (piede, sed detalojn vidu p. 5).

Promenante al tiu rendevuo vi vidos lim- kaj memor-ŝtonojn, belajn pejzaĝojn,... Vidu la belgan itineron per reta filmeto ĉe https://www.youtube.com/watch?v=dIKrMPLscL8

**04-17** 14h00 200-a dat-reveno de la «Traktato pri la limoj»: trilanda promenado al la trilanda punkto !
Inf. jacques@senlime.org

# ESPERANTO

## Eŭregiona kalendaro 2015-2016 (2/2)




***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

«Trilandaj renkontiĝoj» estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).
La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

**Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro**:
**Jean-Marie Jacques (jacques@senlime.org).**

**01-15 kaj 02-18 Vintra paŭzo** (ni **ne** kunvenos).

**03-18** 20h00 Kelmis, Select: "Se la franca lingvo plen-plenigas mian memoron, male esp-o ĝin malplenigas" (sekvo), **prelego** de R. **Demarche**.
Inf. jacques@senlime.org

**04-15** 20h00 Kelmis, Select: "Novaj esperantistoj", prelego de Jean-Marie **Jacques** (kun filmeta projekciado).
Inf. jacques@senlime.org

**04-17** 16h00 Trilanda punkto: pro la 200-a datreveno de la traktato pri la limoj, promenado kaj renkontiĝo trilandaj (neorganizitaj!).
Inf. jacques@senlime.org).

**05-20** 20h00 Kelmis, Select: "Islando, tero el glacio kaj fajro" (sekvo), prelego de José **Jacob** (kun lumbildoj).
Inf. jacques@senlime.org

**06-17** 20h00 Kelmis, Select: tradicia karaoke-vespero de ***Senlime***.
Inf. jacques@senlime.org

**07-15 kaj 08-19 : Somera paŭzo** (ni **ne** kunvenos).

**15-01 et 18-02 Pause d'hiver** (nous **ne** nous réunirons **pas**).

**18-03** 20h00 Kelmis, Select: "Si le français bourre ma mémoire, l'espéranto, au contraire, la soulage" (suite), **conférence** de R. **Demarche**.
Inf. jacques@senlime.org

**15-04** 20h00 Kelmis, Select: "De nouveaux espérantistes", conférence de Jean-Marie **Jacques** (avec projections).
Inf. jacques@senlime.org

**17-04** 16h00 Trois-frontières: 200-ème anniversaire du traité des limites, promenade et rencontre d'espérantistes des 3 pays (non organisées!).
Inf. jacques@senlime.org).

**20-05** 20h00 Kelmis, Select: "Islande, terre de glace et de feu" (suite), conférence de José **Jacob** (avec dias).
Inf. jacques@senlime.org

**17-06** 20h00 Kelmis, Select: traditionnelle soirée-karaoké de ***Senlime***.
Inf. jacques@senlime.org

**01-15 et 19-08 : Pause d'été** (nous **ne** nous réunirons **pas**).

# Verviersa Angulo

## Verviersa Esperanto Grupo

*Kelmis-Amikejo, Verviers, Eurégion Meuse-Rhin,...*

# *Senlime* vous informe !

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEŬ)
Tél. 087/22.10.79
Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30
Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

**Ass. pour l'Espéranto (A.P.E.):**
www.esperanto-wallonie.be
Paul Kerris, secrétaire
103 rue Windt
4850 PLOMBIERES
Tél. 087/39.85.70
paulkerris@skynet.be

## Cotisations

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte

**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information ne sera plus intégré à la revue de APE «Espéranto en marche», qui a choisi de ne plus s'éditer sur papier.*

*La cotisation pour **Senlime** reste fixée à **10 Euros** (ou 22 Euros si vous voulez un abonnement à cette revue sur papier).*

**Indiquez les nom, prénoms et domicile du membre cotisant:**
***«cotisation de.... pour....».***

### INVITO AL BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO (komuniko de la organizantoj)

*KIAM?* 16 sept. - 19 sept. 2016

*KIE?* Cultuur-hostel "Bed-Muzet" Volmolenstraat 65, BE-2500 Lier

*POR KIUJ?* POR VI!
Nia kongreso celas ĉiujn: infanoj, adoleskuloj, junuloj, plenkreskuloj, komencantoj, fluparolantoj, BeNeLuksanoj, ekster-BeNeLuksanoj…

*KION?*
Jam delonge BNL-K estas LA Esperanto-renkontiĝo en BeNeLukso: internacia dank'al la partoprenado de multaj flandroj, valonoj, bruselanoj kaj ekster-landanoj, profesie organizita, malfermita al ĉiuj, kaj kun bonegaj manĝoj. ;-).

Tiel kiel por la antaŭaj BNL-Kj ni preparas ampleksan kaj mojosan programon: Esperanto-kursoj kaj ekzamenoj diversnivelaj, fakaj prelegoj, diversnivelaj koncertoj, promenadoj, ekskursoj, manlaborado por plenkreskuloj kaj por infanoj, turisma biciklado por ĉiuj (ne)sportemuloj, libroservo de FEL kaj Eldonejo Libera.

Komencantoj, progresantoj kaj spertuloj: kaptu la okazon de 4-taga kursumado kaj/aŭ praktikado kun fluparolantoj kaj denaskuloj!

*KIU ORGANIZAS?*
**FEL**, la mondfama "Flandra Esperanto-Ligo", estas iniciatinto kaj iniciatanto de multaj Esperanto-projektoj. Ekde jaroj, ni (kun)organizas diversajn Esperanto-renkontiĝojn. Niaj membroj ne nur venas el Flandrio, sed el diversaj landoj tra la mondo, kaj ili parolas diversajn lingvojn.

Esperanto estas nia sola komuna lingvo. Do partoprenante BNL-K-n, vi ne nur lernos, ĝuos kaj ĝojos, sed vi ankaŭ helpos disvastigi Esperanton.

*INFORMOJ KAJ ALIĜILO:*
http://bnlk2016.weebly.com/
aŭ: nicky24@telenet.be
Nicky Janssen 0488/352202.

AVIS DE LA REDACTION:
Non seulement le programme de ce congrès s'annonce très intéressant mais la ville de Lier (Lierre en français) à elle seule, particulièrement jolie et agréable vaut le déplacement (elle est à Anvers ce que Spa est à Verviers ou Liège). Un très bon week-end en perspective!

Ce type de rencontre convient parfaitement pour les (vrais et faux) débutants, qui ont l'occasion de se familiariser avec la langue de Zamenhof et le mouvement qui la porte. A ne pas manquer!

– – – –

**PEKO 2016**

**P**rintempa **E**speranto **K**ongreso estas mojosa intergeneracia kaj internacia kongreso en Belgio. Esperanto-kursoj diversnivelaj, faka seminario, koncertoj, promenadoj, ekskursoj, prelegoj, manlaborado por infanoj (kaj aliaj), libroservo de **FEL**.

De la 4-a de majo (17-a h.) ĝis la 8-a (16-a h.) en La Marlagne, Ch. des Marroniers 26, 5100 Wépion.
info@verdajskoltoj.net
Tel. +32 71 165 395
+32 485 517 552

# INVITO al TRILANDA PROMENADO

Okaze de la 200-a datreveno de la traktato pri la limoj de Neŭtrala Moresneto (Amikejo, nuna Kelmis), la esperantista grupo de Verviers (*Senlime*) invitas vin al promenado tra la arbaro «Preusswald» kaj trilanda renkontiĝo ĉe la trilanda punkto (BE-DE-NL), dimanĉon la 17-an de aprilo 2016.

La promenado foriros de Moresnet (Chapelle), rue d'Aix (foto). Venante de Kelmis, sekvu la vojindikilojn al Moresnet kaj Vaals. Elireje de Kelmis, vi pasos sub granda (stranga: duetaĝa) fervoja ponto. Je la posta rondoplaco daŭrigu antaŭen ĝis la sekvonta vojkruciĝo, kie vi ĝiros dekstren. Tiu estos la strato al Akeno [Akvisgrano], longa rektlinia strato kiu fine pasas sub alia fervoja ponto, kiu estas nia rendevuejo, kaj iĝas tera vojo. Lasu vian veturilon antaŭ tiu ponto aŭ tuj poste (estas parklokoj dekstre en la arbaro).

Se vi deziras piediri (11 km) al la trilanda punkto kaj same reveni, vi estu ĉe la rendevuejo plej malfrue je 14h30. Se vi deziras piediri nur dum 5-6 km kaj aŭtomobile reveni, alvenu tie plej malfrue je la 14a por partopreni kunveturadon: la ŝoforoj (sen la pasaĝeroj) tuj daŭrigos al la trilanda punkto, kie ili lasos parton de la aŭtomobiloj sur la belga parkejo, piede de la turo (atenton: la uzo de parkloko tie estas pagenda) dum la alia(j) rekondukos ĉiujn al Moresneto, kie ili estu revenintaj... ĉirkaŭ la 14h30 por la pieda foriro kun Jean-Marie **Jacques**.

La promenado relative facilas. Survoje, ni du-tri foje haltos dum kelkaj minutoj por rigardi limŝtonon aŭ alian kuriozaĵon kaj tiel alvenos al la trilanda punkto, kie okazos la renkontiĝo kun la aliaj esperantistoj, **je la 16a horo**.






Tiam ni kune ariĝos piede de la turo Baudouin, antaŭ la trilanda ŝtono, kie ni kune kantos la himnon de Amikejo (kunportu la partituron (el la lasta paĝo de nia informilo) kaj faros memorigan foton.

Ni ne forgesu, tuj poste (16h30), rekonduki al la deirpunkto la ŝoforojn kiuj forlasis sian veturilon.

<u>**Ne forgesu**</u> sciigi al J-M. Jacques (adreso p. 1) pri via partopreno (kaj precipe kunveturado!).

# HIMNO DE AMIKEJO

